Ĉe ni, komence de XX jc., la lokomotivisto kaj liaj laciĝoj sugestis «himnon» al Adolfo De Bosis, vervigianto de *Convito* kaj redaktanto de la aristokrata samnoma roma gazeto. Poemo kun aparta socia engaĝo, *A un macchinista* (*Al lokomotivisto*), kiu meritis la laŭdojn de D'Annunzio, malgraŭ la retoriko, kiu fontas el ĉiu verso, kvazaŭ el ĉiu vorto, ankaŭ kiam la poeto intencas bondeziri kaj antaŭenkonduki pli bonajn homajn rilatojn, fleksante kiel eble plej multe al proleta kompreno la sinceran lingvaĵon, bonmaniere, fare de plumlaboristo.

*Ĉi tien la manojn, ho kamarado! Kio gravas*
*Se via manpalmo nigras pro karbo*
*kaj ŝmiriĝas pro lubrikeca oleo?*

*Freŝa akvo baldaŭ purigos niajn manojn*
*(sed pri aliaj manoj ĝi ne povos, tiajn,*
*kiujn aliaj premas malsingarde).*

*Kaj vi povas premi tiujn ĉi miajn, se la laciĝo*
*liberigas, ĝi stampis sur ilin ja multajn kalojn,*
*mian noblecan insignon.*

La italoj ne tro ŝatas anonimajn aŭ prikonjektitajn arkitekturaĵojn. Pro tio la stacidomoj ĉiam estis sufiĉe neglektitaj, kaj certe almetitaj je dua rango kompare kun trakoj kaj trakciiloj. Kvankam komence ne estis ja tiele.

«En loko ekster la antikvaj muregoj de la Urbo Napoli, inter Pordego *Nolana* kaj Pordego *Carmine*, instaliĝis la unua stacio destinita ricevi varojn kaj gardi ilin ĝis la momento de disliverado tra la Urbo». Lokalizita per tiuj ĉi vortoj la lokon de la kapstacio de la unua traktrunko, tiel daŭris en 1840), la priskribo. «Estas unue du domoj, dekstre kaj maldekstre de la ĉefa enirejo, kunigitaj inter si per kovrita staciplaco: la dekstra konstruaĵo utilas al la vojaĝantoj, kiuj okupas la sidlokojn en la 1-a kaj 2-a klasoj, kaj tiu maldekstra al vojaĝantoj de la 3-a kaj 4-a klasoj». Kaj, sub la kovrita staciplaco «kvar vojoj», kvar trakoj.

Poste, la reto ekvidis renovigitajn stacidomojn (F.V. = *Fabbricati Viaggiatori* = domoj por vojaĝantoj), kiuj, per pli grandaj dimensioj kaj nova monumenta karaktero, perfidos kelkfoje ilian originan esencan funkcion. Oni rigardu la stacidomojn de Genova P.P., Torino P.N., Roma Termini, Milano kaj Trieste, sed ne ĉiam la projektado de tiuj domoj sukcesis atingi la originalecon kaj linipurecon de la torina Porta Nuova. Tamen kvazaŭ ĉiam temis pri du masonstrukturoj interligitaj per vitraltegmento, kaj, laŭlonge de la domrandoj, tutaĵo da portikoj. Prototipo estis iasence la dua stacidomo Napoli Centrale, kiun oni prilaboris, projektisto Alvino, tuj post la konkero de la Reĝlando de la Du Sicilioj. Verko laŭ urba reguliga plano, ĝi enŝoviĝis, kun bonefiko, en la planimetrion de la ĉirkaŭaj kvartaloj, en la nova trafikvojsistemo (ĝis la napolanoj sopiris ĝin, kiam ili vidis ĝian malaperon por lasi lokon al la nunaj, tre modernaj in-

stalaĵoj). En aliaj kazoj temis pri pavilono, centre kunligita al du aliaj pli malgrandaj flanke, kiel en la malnova stacidomo de Milano, en tiu de Verona Porta Nuova, aŭ en Genova Brignole.

Palermo eĉ ne povis eskapi la regulon, nek povus fari pli multe, post la ekzemplo de Torino, Napoli kaj Roma Termini. Ankaŭ se iu volas vidi, eble senkaŭze, la influo de Basile, loka arkitekta geniulo, en la ĝenerala skemo, en tiuj biforoj anakronismaj kaj senkarakteraj. Malfermita al la publiko en 1885 (la trajno komencis sian sicilian vojon, Bagheria-Palermo, aprile 1863), kaj ĝi ankoraŭ utilas, post elteno de radikalaj laboroj por pligrandigo kaj modernigo.

Kaj nun, posedante trajnon kaj staciojn, oni povas ankaŭ ekveturi. Sufiĉas nur konsulti la horaron.

Sen ĝeni la *Tabula Peutingeriana*, mezepoka itiner-fantazio trapuntita per memoroj de antika grandeco, la originoj de la fervoja horaro oni serĉu nepre en publikaĵoj, kiel, elektante inter multaj, *Direzione pe' viaggiatori in Italia colla notizia di tutte le poste e loro prezzi* (*Gvidlibro por vojaĝantoj en Italio kun informoj pri ĉiuj (gast-)altejoj kaj iliaj prezoj*) aperinta en Bologna kun dulingva teksto, itala kaj franca, en 1771, kaj tre konata. Ĝi estis rekta antaŭulo, kaj des pli pitoreska, pro iuj siaj parolantaj topografiaj prezentadoj de urboj, vilaĝoj kaj poŝtaj stacioj.

Aparta horaro pri iu fervoja linio, anstataŭe, naskiĝis kun la inaŭguro de la linio mem, por montri la veturojn, la prezojn por ĉiu klaso, la manierojn respektendajn. Poste ĝi plidensiĝis, laŭgrade kiam la veturoj multiĝis kaj la linia mastrumado komplikiĝis. Por ĉiuj informoj sufiĉis simpla folio, kiu ofte oni «disdonis senpage», kiel ekzemple tiu de *Strada di Ferro tra Napoli, Nocera e Caltellammare* (*Fera vojo inter Napoli, Nocera kaj Castellamare*). «Estas malpermesate al la personoj, kiuj ne estas dece vestitaj lokiĝi en la 1-a-klasajn vagonojn pro polica ordono. Estas malpermesate enkonduki hundojn en la 1-a- kaj 2-a-klasajn vagonojn. Por la hundoj oni pagas laŭtarife».

Anstataŭe, estas «vendebla ĉe Agentejoj kaj Fervojstacioj je la prezo de bajokoj 2», *Orario e Regolamento della Strada Ferrata da Roma a Frascati aperta al pubblico il giorno 14 luglio 1856* (*Horaro kaj Reglamento de la Fera Vojo de Roma al Frascati malfermata al la publiko la tagon 14 de Julio 1856*).

Oni estas ankoraŭ ĉe la originoj, kaj oni veturas sur linioj je loka intereso. Sed jen, la 10a de Majo 1862, en la unuiĝinta Italio (escepte de la papa Latio), la horaro de Milano-Bologna-Ancona. Temas pri 420 kilometroj, kaj la prezoj de Milano al Bologna estas lirojn 22,30 en la 1-a klaso, 17,30 en la 2-a, 12,80 en la 3-a.

Ĝuste kvar jaroj poste aperis *Indicatore Generale* (*Ĝenerala Horarlibro*), Oficiala Horaro de la Fervojoj kaj de la Navigado de la Itala Reĝlando, kaj troviĝas «Internaciaj servoj» kaj ĉiuj publikaj servoj en Italio kaj en la ĉefaj urboj en Eŭropo. Un *Orario pei viaggiatori* (*Horaro por vojaĝantoj*) vendata en Italio, je la prezo de 40 centimoj, sed ankaŭ en Francio kaj Anglio, kiu tamen entenas ankaŭ la restintaj diliĝencaj servoj, kiel montras vinjeto kun ĉevalveturilo eĉ kun postiljono kaj kvarelementa jungaĵo.

Post ne longe falis la francismo

*Indicatore*, dum *Indicateur* ankoraŭ nun daŭre kutimas nomumiĝi en Francio la fervoja horaro, sed ne pro tio ĉesos la stimulaj instigoj el serĉado de la koordinadoj trajno-stacio (koditaj de la Horaro de Fratoj Pozzo, ekde 1899), kiuj ne malofte permesas al ni firmigi niajn dezirajn pensvagademojn. Nepre necesa manlibro por moderna homo, gvidlibro en kiu, en 1910, la poeto Marino Moretti deziris provi sian inspiron: la «versoj plenaj je kara infaneco», kiel taksis ilin Saba, de *Orario ferroviario (Fervoja Horaro)*, poste inkluzivitaj en *Poesie scritte col lapis* (*Poemoj verkitaj per krajono*).

*Ĉion vi scias: morojn, hotelojn, datojn*
*kaj ĉion vi instruas por ĉiu vojaĝo.*
*Vi servas al tiu, kiu rapidtralegas*
*tiel preciza estas via lingvaĵo.*

*Bone vi konas la staciojn, vi scias eĉ kiuj*
*kapablas oferti manĝ- aŭ nur trinkaĵojn*
*kaj vi tion montras al ni per tranĉileto*
*kaj per forketo aŭ per iu glaseto.*


*Bone vi konas la numerojn obeemajn*
*enviciĝantaj enkulumne sur la paĝoj:*
*tiuj numeroj, kiujn vi ne sumigas,*
*ĉiuj estas horoj de la viv' sendorma.*

Poste oni alvenas al celo kaj oni devas tranokti.

En 1855 «kavaliro» Alessandro Rufini, fekunda, kvankam neklera verkisto, presigis en Roma elegantan libreton kun ne mallonga, sed klara titolo *Notizie storiche intorno alla origine dei nomi di alcune Osterie, Caffè, Alberghi e Locande, esistenti nella Città di Roma* (*Historiaj informoj pri la origino de la nomoj de iuj Gastejoj, Kafejoj, Hoteloj, Pensionoj, ekzistantaj en la Urbo Roma*). Flankelasante ĉiajn opiniojn pri la verkmerito, nia erudiciulo sukcesis listigi, laŭ lokiĝo kaj «aldonante la originan indikon pri ĉiu nomo», eĉ 573 gastejojn, 29 manĝejojn, 31 pensionojn, 22 hotelojn kaj 153 kafejojn.

Inter la multaj ŝildoj, kiuj originas el la plej diversaj disciplinoj aŭ el la multvariaj homaj aktivecoj, oni vane serĉus nomon kun ia ajn rilato al la fervoja mondo. Estas iu *Osteria del Vapore* (*Gastejo de l' Vaporo*), sed «oni nomas ĝin tiel - klarigas la kompilinto - ĉar ĝi havas kiel ŝildon iu «*legno a vapore* (*vaporligno*)». Kie «ligno», bedaŭrinde, signifas ŝipo, lignoŝipo, barko. Ankaŭ pro la fakto, ke en la Papa Ŝtato la trajno komencos kuri (por tiel diri) nur en la jaro post la apero de la gvidlibro de Rufini, kaj laŭ la vojo Roma-Frascati.

Malgraŭ la malfrua enkonduko en la Roma-mondon, la teknika revolucio alportita en la transportfako fare de la fera vojo, male, ĝi havis tujajn sekvojn en la kutimoj de aliaj religioj kaj popoloj. La industriaj ekipaĵoj, la gastiga arto mem, devis konformiĝi al renovigita turisma fluo alportata de la trakoj. La dinamiko mem de la urbaj agregatoj spertis apartan altiron favore al alproksimiĝo al la fervojo, dum komencis perdi intereson ĉio, kio ĝis tiam gravitis ĉirkaŭ la diliĝencoj, al la poŝtstacioj. Konsekvence, iom post iom, malaperis ankaŭ la ŝildoj rilatantaj tiun ĉi trafikon.□



Pro ricevo de "ITALA FERVOJISTO - Informa Bulteno"-n, skribe dankis kaj/aŭ iel reagis: *Tazio Carlevaro, Renato Corsetti, Antonio De Salvo, Sylviane Lafargue.*□

Por LKK

# P A R T O P R E N I L O

**en la 59-a Kongreso de la**
**Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)**
**Parizo, Francio de la 12-a ĝis la 19-a de majo 2007**

Kongresadreso:
AFCE/UAICF
59-a IFEF-Kongreso
9 rue du Château-Landon
FR-75010 Paris - Francio
Tel. +33(0)1 48 53 05 52
Retadreso: sylviane.lafargue@sncf.fr

Bankkonto: AFCE
CCP: 52 14 35 H Paris
IBAN: FR19 3004 1000 0105 2143 5H02 069
BIC: PSSTFRPPPAR

Mi aliĝas al la 59-a IFEF-Kongreso

Viro ☐ Virino ☐ IFEF-membro: Jes ☐ Ne ☐ Vegetarano ☐

Familia nomo: ……………………………………………………………………………..…………………

Familia nomo laŭ esperanta prononco: ………………………………………………………………………

Persona nomo: ………………………………..………….…… Naskiĝjaro …….……..………….

Strato ……………………………………….…………………….……..…………..N°: …..……………

Poŝtkodo kaj urbo: ……………………..…………….…………..… Lando: ………….…….………...

Telefono: …………………………...………… Retadreso: ………….………………….…………..

Samtempe aliĝas: ………………………………………………………...…………………………..

| **Kongreskotizo prezo en €** | **Ĝis 2007-01-31** | **Poste** | **Sumo** |
|---|---|---|---|
| IFEF-membro | 50 | 60 | |
| Familiano, junulo ĝis 28 jaroj kaj anoj de eksaj socialismaj landoj | 25 | 30 | |
| Ne IFEF-membro | 60 | 70 | |
| Bankedo | 30 | | |
| Tuttaga ekskurso (Versailles - Elancourt) | 60 | | |
| Duontaga ekskurso D1 | 20 | | |
| Duontaga ekskurso D2 | 20 | | |
| Tranoktado por la tuta periodo ……… noktoj x ……..….. (laŭ elektoj) (*Vidu klarigojn en la paĝo 2*) | | | |
| Manĝo-kuponoj (*vidu en la paĝo 2*) | | | |
| Kongresglumarkoj (po 24 por unu folio) | …… x 1,5 | | |
| Krompago por libervola donaco | | | |
| **Tuta sumo** | | | € |

Loko, dato: ………………………..………..….  Subskribo: ……………..……………..…………….

Por LKK

# Ĉambromendilo / Manĝokuponoj

Viro ☐ Virino ☐

Familia nomo: ……………………………………………………………………………..…………………

Persona nomo: ………………..……………...…………………………….….……………..………….

Strato ………………………………………….….………………….……..…………..N°: ……………………

Poŝtkodo kaj urbo: ………………………………….………….…. Lando: …………….….………….…

Telefono: ……………………………..………… Retadreso: ………….……………………….…………..

Mi deziras loĝi kun: ………………………………..…………………………………………………….

Mi mendas ĉambron por la noktoj:

| 12/13 | 13/14 | 14/15 | 15/16 | 16/17 | 17/18 | 18/19 |
|---|---|---|---|---|---|---|
| ☐ | ☐ | ☐ | ☐ | ☐ | ☐ | ☐ |

*La prezoj estas en € por unu nokto kun matenmanĝo por unu persono :*

**Ĉambroj troviĝantaj en la komgresejo mem :**

En unulita ĉambro 38,00.

En dulita ĉambro 28,00.

**Ĉambroj troviĝantaj ne en la kongresejo mem, sed en Kellermann**. Ĝi estas atingebla per metroo-stacio « Porte d'Italie » aŭ per urbaj aŭtobusoj « PC » :

En 3/4-lita ĉambro 20,00.

En oklita ĉambro 17,00.

**Post la unua de Marto, ni ne plu garantios la tranoktadon.**

Aĉeto de kuponoj por tag- kaj vesper.manĝoj en memserva restoracio (10,00 € sen trinkaĵo).

Ni atentigas vin pri la fakto ke :

- tiu servo okazas en la kongresejo mem,
- estas devige antaŭmendi la manĝkuponojn,
- ne eblas interŝanĝi la elektitajn datojn de la kuponoj,
- **ne eblas aĉeti manĝkuponoj surloke.**

*Neniu restoracio facile atingebla situas en la proksimeco.*

Konseguence mi antaŭmendas manĝo-kuponojn por :

| Datoj | 12 | 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Tagmanĝo | ☐ | ☐ | ☐ | ☐ | ☐✪ | ☐ | ☐ |
| Vespermanĝo | ☐ | ☐ | ☐✪✪ | ☐ | ☐ | ☐ | ☐ |

✪ Tuttaga ekskurso ✪✪ Bankedo

Mi petas ……..….. kuponojn x 10,00 € = ……..……… €

Mi alvenos en Parizo

Per (trajno, aŭtomobilo ktp.) …………..……… la ……….. an de Majo je la ………… -a horo.

Mi deklaras, ke mi havas propran san- kaj akcident-asekuron por mia restadtempo en Francio dum la 59-a IFEF-Kongreso, Jes ☐

Loko, dato: ……………………..……..…. Subskribo: …………….…………..…………………….

## Ĝeneralaj Instrukcioj

l. Ĉiu partoprenanto bonvolu plenigi kaj sendi apartan partoprenilon por la kongreso kaj por la post-kongreso al la adreso de LKK. Ankaŭ familianoj sendu apartan partoprenilon kaj indiku reciproke la parencan rilaton.
2. Skribu majuskle kaj preslitere aŭ tajpe, donante ĉiujn petitajn detalojn.
3. Sendu la pagon al la indikita bank-konto plej malfrue ĝis la 28-a de februaro 2007. Precize atentu pri la kontonumero.
4. LKK povos trakti la partoprenon nur post la alveno de la tuta pago, *(du monatoj antaŭ la kongreso ni devas pagi la tutan restadon al la firmao).*
5. LKK akceptas la pagojn nur en Eŭroj.
6. Se vi pagas por alia persono, kiu nepre devas sendi apartan partoprenilon, menciu ekzaktajn detalojn pri la koncema persono (nomo, lando, adreso).
7. Kongreskotizo ne estas repagebla, eĉ por kiu ne ĉeestas la kongreson. Ceteraj antaŭpagitaj sumoj estos repageblaj post la depreno de 10 % por administrado, kondiĉe ke LKK ricevos la malmendon antaŭ la 15-a de aprilo 2007.
8. LKK havas la rajton rezervi pIi alt-kategorian ĉarnbron, se la mendita kategorio elĉerpigis antaŭ la alveno de la mendo de la partoprenonto.
9. LKK akceptas la ĉambromendon, nur kiam la tuta tranoktado estas pagita. LKK traktos la ĉambromendon sengarantie, se gi alvenos post la l-a de marto 2007.
10. LKK konfirmos la ricevojn de partoprenilo kaj pago per sendo de konfirmletero, kiu estos via legitimilo. Nepre kunportu ĝin al la kongreso. La kongreskarton oni ricevos dum la registrado ĉe la alveno. La kongreskarton oni ne rajtas vendi, transdoni aŭ interŝanĝi.
11. Bonvolu noti pro via intereso, kion vi mendis kaj pagis.
12. LKK havas la rajton ŝanĝi la prezojn, se inflacio aŭ ceteraj ne antaŭvideblaj kondiĉoj devigos tion.
13. Kongresanoj rajtas tag- kaj vespermanĝi en la kongresejo favorpreze por la tuta kongresa semajno.
14. Turisma Hotelo "Kellermann" havas 3/4 kaj 8-litajn cambrojn kun duŝejo. La prezo de ambaŭ kategorioj inkluzivas matenmanĝon. La hotelo estas atingebla per metroo (linio 7) aŭ per aŭtobusoj (linio "PC") - (stacihaltejo "Porte d'Italie") .

N.B.: ne aĉeteblas manĝkuponojn surloke.

Se vi deziras tag- aŭ vespermanĝi en la kongresejo, antaŭmendu kaj antaŭpagu la manĝkuponojn pere de la partoprenilo.

-------------------

## Provizora programo de la 59-a IFK

11.05 Ven. Informejo, Akceptejo
12.05 Sab. Gazetara konferenco, IFEF-estraro kaj LKK, Interkona vespero
13.05 Dim. Informejo, Akceptejo, Libroservo, Faka Komisiono, Inaŭguro, Komuna fotado, "Montmartre" trajneta ekskurso (D1), Komuna nacia vespero
14.05 Lun. Informejo, Libroservo (informoj por la postkongresanoj), Komitatkunsido nepublika, Duontaga ŝip-ekskurso (D2), Bankedo, Internacia balo
15.05 Mar. Informejo, Libroservo, Plenkunsido publika, Faka Komisiono, Prelego (Sur la vojo al Santiago de Campostela)
16.05 Mer. Tuttaga ekskurso (Versailles - Elancourt) (T1)
17.05 Ĵaŭ. Informejo, Labroservo, Fakprelego, Fervojaj novaĵoj, La 60-a IFK prezentas sin, Fakprelegoj, Forumo "Movadaj aferoj", Fervojaj novaĵoj, Distra vespero
18.05 Ven. Informejo, Libroservo, Faka Komisiono, Solena fermo, Adiaŭa vespero
19.05 Sab. Hejmenveturado, La postkongresanoj ekveturas al Lyon.

## Vizaĝo de FRANCIO

Mezarea lando, Francio estas unu el la plej vastaj landoj en Eŭropo.
Lokita inter 42° kaj 51° norda latitudo, ĝi ĝuas mezvarman klimaton. Okcidente de Eŭropo, ĝi situas sur istmo inter, iuflanke, Norda maro, Manika Maro, Atlantika Oceano, kaj aliflanke Mediteraneo.
Konsekvence, ĝi estas samtempe:
- mediteranea lando, ĝi estis modlita de grekolatina civilizado; allogita al koloniaj konkeroj, ĝi ankoraŭ nuntempe, konservas multajn ligilojn kun afrikaj kaj orientaj landoj;
- atlantika lando, ĝi partoprenas la intensajn fluadojn de maraj kaj aeraj navigadoj inter la malnova kaj la nova mondoj.

La teraj landlimoj estas naturaj: Rejno, Ĵuraso, Alpoj kaj Pireneoj, sed, ili ankaŭ devenas de la historio kaj estis longtempe pridiskutitaj.
La franca unueco finfine efektiviĝis post la Revolucio kaj reĝimoj centralizitaj. Ĝi kreis komunaĵon dotitan de nacia lingvo, lingvo romanika devenanta de la popola latino.
Tiu unueco ne komplete aboliciis la regionajn diversecojn. La malnova distingo inter la lingvoj okcitana (sude) kaj ojlitana (norde), retroviĝas en kelkaj vivemaj patezoj.
Germanaj dialektoj ankoraŭ estas uzitaj en Flandrio kaj Alzaco; la kelta lingvo ne tute malaperis en Bretonio kaj la Vaskoj parolas lingvon strange simila al kaŭkazaj lingvoj.
Ekde 1968, la doganaj limoj viŝiĝas: la homoj kaj la varoj libere cirkulas en Eŭropa Komunaĵo. Tamen, bariloj ankoraŭ postrestas, tiuj de la lingvoj.

## PARIZO

105 km$^2$; 2.147.867 da logantoj;
ĉirkaŭaĵo: 2000 km$^2$; 20 distriktoj;
pli ol 11,5 milionoj da loĝantoj

- La centro de la urbo entenas multajn laborojn, ĉefe en laborservoj (Borso, grandaj bankoj, politikaj kaj adrninistraj servicoj, grandaj magazenoj, spektakloj). En ĝi ankoraŭ troviĝas la intelekta aktiveco (Latin-kvartalo).
Tiel, ankoraŭ nuntempe, Parizo kontrolas multajn provincajn aktivecojn.
- La okcidenta parto (parko Monceau, Chaillot, Passy) estas la Parizo burĝa kaj restadeja; - La orienta parto, la popola Parizo (ekzemple: Belleville).
En Parizo, la urbaj pejzaĝoj estas tre kontrastaj: - malnovaj kvartaloj (Marais kun siaj eks-riĉaj hoteloj); - kvartaloj kun riĉaspektaj konstruaĵoj: ĉirkaŭ Le Louvre, Opéra kaj Champs-Élysées; - negoco-kvartalo: Maine-Montparnasse; - movplenaj kvartaloj: ĉirkaŭ la stacidomo St Lazare kaj la Grandaj Bulvardoj; - industriaj kvartaloj: Batignolles, kanalo St Denis; - la kvietaj kvartaloj: la insulo St Louis; - la ĝardenoj: Luxembourg, Tuileries, Buttes Chaumont; - la arbaroj: Vincennes, Boulogne.

### KROZADO sur la kanalo St Martin

De la plezurhaveno de "Paris - Arsenal" ĝis la parko "La Villette", vi travivos promenadon romantikan kaj eksterkutiman, dum ĉirkaŭ du horoj kaj duono, la historion de la parizaj kvartaloj laŭflue rakontatan.
Vi malkovros tiun kanalon, kun ties kvietaj akvoj, rande borditan per centjaraj arboj, krucitan per elegantaj pontetoj.
Sub la mistera volbo de "La Bastille", la spektaklo-ĉefverko de la japana artisto Kéiichi Tahara "Eĥo de lumo", naskos al vi magiajn momentojn.
Vi trapasos kvar kirliĝantajn kluzojn, du turniĝantajn pontojn; vi revivos "la etoson" de la "Norda Hotelo" kreita de Marcel Carné, Arletty kaj Louis Jouvet; vi partoprenos la plezuron de la promenantoj laŭ la bordoj vigligitaj per beletaj butikoj kaj trinkejoj malnovaj kaj ĉarmaj.
Antaŭ ol atingi la Parkon de La Villette (la Domaro de la Scioj, la Geodo, la Domaro de la Muziko, la pritemaj ĝardenoj, vi tranavigos la basenon de La Villette, antaŭe komercan havenon kaj

hodiaŭ reordigita por valorigi la Rotondon de La Villelle; kaj vi glitos sub la mirindan leveblan ponton de Krimeo.

## Montmartre: ĉiama vilaĝo

Sankta monteto de la romiaj temploj kaj politika monteto de Henriko IV, ĝi antaŭgardis sian kultan kaj artan identecon, gastigante la plej grandajn pikturajn movadojn dum la XIX kaj XX jc. (impresionismo, kubismo, fauvismo, futurismo, surrealismo).
Hodiaŭ, ĝi ankoraŭ estas loko de vivo kaj de historiaj kaj kultaj malkovroj, frekventitaj de pli ol ses milionoj da vizitantoj, kiuj ŝatas vagiri tra la tipaj stratetoj de la malnova Parizo.
Loko de kreado, ĉiam, ĉe la angulo de ŝtuparo oni renkontas pentrostudentojn, sed ankaŭ la filmadon post vojturno.
La "Japana Divano" iĝis la "Divano de la Monda Muziko", kaj la dancistoj ne plu estas aplaŭditaj en "Ruĝa Muelejo" sed en "Teatro de la Urbo", placo de la Abatinoj, kie oni povas ĝui aktualan programon.

## Versailles, la suno-reĝa kastelo

Versailles estis vilaĝeto arbarmeze.
Ludoviko XIII konstruigis tie, kasteleton el brikoj, ĉar li ŝatis veni en tiun lokon por ĉasi. Tiu malgranda kastelo, beligita de lia filo Ludoviko XIV, ankoraŭ nun, ĉirkaŭas la Marmoran Korton.
Por konstruigi Versailles, Ludoviko XIV kunigis ĉirkaŭ si famajn artistojn kaj arkitektojn: Le Vau (arkitekto), Le Notre (ĝardenisto), Le Brun (pentristo). Versailles fariĝis la ĉefa rezidloko de Ludoviko XIV en 1682. Li reĝis de 1661 ĝis 1715.

## Vizitu la tuton de Francio!

Viziti la tuton de Francio dum posttagmezo? Jes, eblas! La parko "France-miniature" situas meze de la nova urbo Saint-Quentin en Yvelines, je 20 km-oj de Parizo.
Apud Parizo, "France-miniature" ebligas la vizitantojn admiri la replikojn de 158 historiaj monumentoj kaj francaj pejzaĝoj, sur vastega mapo de Francio, 5 haojn vasta. Tiuj maketoj tipe elvokas la francan kulturon; 60 maketistoj laboris por realigi tiujn malgrandajn ĉefverkojn, en skalo 1/30.
Ekzemple, *la kastelo de Chambord,* petis pli ol 2.800 horojn da laboro! Plue, 5 km-oj da fervojoj, traveturitaj de miniaturitaj trajnoj, certe mirigos la fervojistojn ...
Inter la 158 pejzaĝoj aŭ monumentoj, 11 estas klasitaj kiel "monda kultura heredaĵo de UNESCO."
Vi ankaŭ malkovros kvar novajn vojojn laŭtemajn : "Gastronomio kaj grundo", "Franca historio", "Fabeloj kaj legendoj", "Aktualeco kaj famuloj". Vi vidos aŭtentajn provincajn vilaĝojn kun ties loĝantoj, koloraj bazaroj, foiraj festoj ...
Kaj, ni ne forgesu la Palacon de la miniaturo, entenantan maketojn faritajn de Dan Ohlmassu. Tiu "muzeo" kuntiros vin sine de la infinitezimo; ĝi malkovrigos al vi lokojn tre proksimajn, kiel la kutiman etoson de kvartala spicvendejo, sed ankaŭ lokojn ne atingeblajn, kiel la luksajn salonojn de la pasaĝersipo "France".
Do, oferu al vi magian rondiron de Francio!□

## POSTKONGRESO en LIONO

**Liono,** ĉefurbo de la departamento Rodano, kaj ĉefurbo de la regiono Rodano-Alpoj.
**La liona urbaro** havas privilegian situacion sine de la rodana valo.
Natura rivero-sulko, ĝi estas randita:
norde de la bojoleza regiono, okcidente de la lionaj montetoj, oriente kaj norde de la izera ebenaĵo.
Vojkruciĝo, Liono ankaŭ estas rivera, fervoja kaj aera krucaĵoj. Tia situo donas al la urbo grandan komercian rolon.
Sed Liono restas kultura metropolo: universitatoj, superaj lernejoj sciencaj, eldonentreprenoj, gazetoj ktp, oferas ĉiujn servojn, kiuj karakterizas grandan urbon.
Nuntempe, multnombraj industrioj: kemiaj, metalurgiaj, teksaj, kontribuas al la ekonomia potenco de la urbaro.
Dank' al siaj strukturoj kaj servoj, Liono

estas la unua regiona ĉefurbo en Francio.

*Vizitoj gvidataj de liona esperantisto*

**- La "Croix Rousse"** (Rufa Kruco), laborista kvartalo, estas monteto, kie oni laboras, male al "Fourvière", monteto kie oni preĝas. Tiu kvartalo estis konstruita komence de la XIX jc. sur posedaĵo de religiaj komunumoj. La deklivoj de la Rufa Kruco estis klasitaj kiel "monda kultura heredaĵo de UNESCO" en 1999.

*La grandaj niveldiferencoj influis la kurbecon de la stratoj, kiuj laŭiras la kurbojn de nivelo aŭ, fronte al la deklivo, iĝas ŝtuparoj.*

La silklaboristoj (les Canuts), vivis en konstruaĵoj speciale elpensitaj por enteni la imponajn teksilojn kaj la novajn teksmaŝinojn eltrovitajn de Jacquard.

En la malnovaj areoj, la mallargaj stratetoj serpentumas inter la altaj konstruaĵoj, traboritaj per "traboules" (mallargaj kondukvojoj inter du stratoj, tra dombloko, por faciligi la piediradon).

La suprenirejo, ĉefa vojo inter Liono kaj la Rufa Kruco, randita per domoj ekde la Mezepoko, konservas, en sia malalta parto, la vizaĝon, kiun ĝi prezentis en la XIX jc. Sed, la plej alta parto estas nun, tute renovigita.

**- La hejmo "de la Canuts"**

Loko de malkovro, plena je la spiritostato de la Rufa Kruco, la hejmo "de la Canuts" (nomo de la lionaj teksistoj), celas al daŭrigi la tradiciojn, la kutimojn kaj la gestojn de la teksistoj, partoprenintaj al la famo de Liono kaj de la silkaĵo en la mondo. La diversaj ekspozicio-ĉambroj eblas sekvi la teknologian evoluon de la teksarto.

La lionaj teksistoj prilaboris fadenojn el silko, sed ankaŭ el oro aŭ argento; la hejmo "de la Canuts" estas la deponejo de iliaj sekretoj, viva konservatorio de la teksarto.

En la labirinto de la silkaĵo, oni gvidas la vizitantojn tra la historio de la silko, tiu mirinda fibro, malkovrita antaŭ 7.500 jaroj, kaj sciigita eksterlanden de ĉina princino (Si Ling Ĉi, edzino de la imperiestro Houang-Ti, 2690 jarojn a.n.e.). Oni malkovras arojn da antikvaj teksaĵoj kaj pasamentaĵoj, ilojn de teksistoj ... Oni ankaŭ povas sekvi demonstrojn per manmaŝinoj kaj mekanikaj maŝinoj.

Nobla teksaĵo, kun ŝanĝ-brilaj rebriloj, la silko kolorigas per riĉa paletro, de la plej brilaj koloroj ĝis la plej mildaj paŝteloj.

Printita aŭ manpentrita, ĝi elegante vestas sin per riĉaj desegnoj aŭ artistaj pentraĵoj. Prilaborita, ĝi kunmetas reliefojn kaj kolorojn por krei la plej belajn teksaĵojn en la mondo.

Rigardante al la estonto, al la alta kudrarto kaj al la artistikaj ellaboradoj, la silkaĵo eniras, kviete, en la trian jarmilon.

**- KoToPo**

KoToPo, estas la fama multkultura ejo, kie oni manĝas kaj travivas viglan vivon.

KoToPo estas loko, kie oni povas aŭskulti prelegojn, partopreni debatojn, spekti spektaklojn, viziti ekspoziciojn aŭ simple sidi en la trinkejo kaj diskuti kun amikoj. Ĉiuj el tiuj diversaj eblecoj havas komunan econ: malfermon al la aliaj kulturoj. En KoToPo, oni povas trovi informojn, ne nur priesperantajn, sed pri plej diversaj lingvoj.

La skipo de KoToPo, ofte internacia, mem helpas krei tiun multkulturan etoson.

**- La malnova Liono**

Ĝi estis, jam en 1964, la unua protektita kvartalo en Francio. Ĝi estas unu el la plej vastaj renesancaj tutaĵoj kaj estas klasita en la monda kultura heredaĵo de UNESCO.

Tiu kvartalo alkroĉiĝas al la monteto-deklivoj de Fourvière. Ĝi organiziĝas ĉirkaŭ tri religiaj konstruaĵoj:

**- La katedralo Sankta Johano**

Ĝi estas la plej malnova, kiu konservas romanikan absidon sed atestas tradician gotikan arton, entenas rimarkindan astronomian horloĝon kaj admirindan centran rozvitralon. Ĝia burbona kapelo estis konstruita en la XV jc.

**- La ĉarma romanika preĝejo Sankta Paolo**, kun sia oktangula sonorilturo, siaj freskoj, datumantaj de 1840, prezentantaj muzikistajn anĝelojn, kaj sia bonega akustiko, taŭgas por la koncertoj.

**- La preĝejo Sankta Georgo**, estis konstruita en la XIX jc. de Bosson, arkitekto de la baziliko de Fourvière. Ĉirkaŭ la preĝejo, la mezepokaj domoj estis larĝigitaj kaj plibeligitaj dum la XVI kaj XVII jc. En 1960, la malnova Liono estis tre difektita, sed dank' al la ŝtato, la urbo, kaj la asocio "Renovigo de la malnova Liono", ĝi vere renoviĝis.

Oni ĝuos la restoracion "Le bouchon lyonnais" (La liona stopilo).

**- La muzeo de la teksaĵoj kaj tiu de la dekoraciartoj.**

Ekskluzive dedicita al la teksaĵo kaj la modo, la Muzeo de la Teksaĵo arkivas, prezentas kaj restaŭras la juvelojn de la teksa tradicio kaj malfermiĝas al la tutmondaj teksaĵoj. Ĝi ilustras la ĉefajn etapojn de la teksa historio: persaj tapiŝoj, koptaj murtapiŝoj, silkaĵoj hispana, sicila, itala, mezorienta. La sekcio pri kostumoj rememorigas la francajn modojn. Kaj ne forgesu la brodaĵon kaj la punton.

Tre proksime, ŝirmita ekde 1925 en la eks-hotelo Lacroix-Laval, la muzeo de la dekoraciartoj estas unu el la maloftaj muzeoj de "etoso" en Francio. La objektoj kaj mebloj prezentitaj, akordiĝas kun la kadro kaj la arkitekturo de tiu tipa hotelo de la klasika epoko.

**- La Baziliko "Sankta Martin d'Ainay"**, (fino de la XI jc.).

Escepta monumento, sude de Liono, inter Rodano kaj Saono, ĝi estas originala per sia transepto, sia kupolo, sia antaŭpordo ankaŭ sonorilturo, sia lanterno-turo kaj ĉefe, per la duobla kolonaro de la navo, kiu memorigas la paleokristanajn bazilikojn.

Vizitoj al SNCF-aj montraĵoj.

**- La centro de la Alt-Rapida Trajno,**

**- La stacidomo "Lyon Guillotière".**

Tagmanĝo en la SNCF-a entreprenkonsilia restoracio de la stacidomo "Lyon Mouche".□

## Ĝeneralaj Instrukcioj

1. Ĉiu partoprenanto bonvolu plenigi kaj sendi apartan partoprenilon por la kongreso kaj por la post-kongreso al la adreso de LKK. Ankaŭ familianoj sendu apartan partoprenilon kaj indiku reciproke la parencan rilaton.
2. Skribu majuskle kaj preslitere aŭ tajpe, donante ĉiujn petitajn detalojn.
3. Sendu pagon al la indikita bank-konto plej malfrue ĝis la 28-a de februaro 2007. Precize atentu pri kontonumero.
4. LKK povos trakti la partoprenon nur post la alveno de la koncernata pago.
5. LKK akceptas la pagojn nur en eŭroj.
6. Se vi pagas por alia persono - kiu nepre devas sendi apartan partoprenilon -, menciu ekzaktajn detalojn pri la koncerna persono (nomo, lando, adreso).
7. La pagita sumo por la postkongreso estos repagata, se la kongreso ne okazos. Se partopreninto ne vizitas la postkongreson, la antaŭpagita sumo estos repagebla post la depreno de 10% por administrado kondiĉe ke la LKK ricevos malmendon antaŭ la 15/04/2007.
8. LKK konfirmos la ricevojn de partoprenilo kaj pago per sendo de konfirmletero, kiu estos via legitimilo. Nepre kunportu ĝin al la kongreso! Bonvolu noti pro via intereso, kion vi mendis kaj pagis.
9. LKK havas la rajton ŝanĝi la prezojn, se inflacio aŭ ceteraj ne antaŭvideblaj kondiĉoj devigos tion.
10. La postkongreso komenciĝos la 19-an de majo post la alveno en la stacidomo Lyon Part Dieu kaj finiĝos la 2l-an de majo post la tagmanĝo.

**Partoprenilo Postkongreso Lyon**

La modelformulo, facile kaj simple farebla laŭ tiu de la kongreso, devas enteni la samajn personajn datenojn kiel tiun por la kongreso.

La prezo validas por la tuta postkongreso de sabato 19/05 post la matenmanĝo ĝis lundo 21/05 post la tagmanĝo. Sed atentu:

**la prezo ne inkluzivas la diversajn trajnbiletojn de Paris al Lyon kaj reiro.**

Prezo en 1-lita ĉambro 170 €
Prezo en 2-lita ĉambro 140 €
Antaŭpago deviga.... 50 € pagota antaŭ la 28/02/2007.□

# Pro o contro la Tav? ma, intanto, chi paga?

L'alta velocità serve o no? Per ora lasciamo da parte il problema. Cerchiamo invece di capire chi, comunque vada la vicenda, metterà i soldi per portarla a termine. E perché, finora, si è già speso oltre tre volte le previsioni?

| Tratte Alta Velocità<br>Sekcioj Alta Rapiceco | Contratti 1991 €<br>Kontraktoj 1991 € | Dati Ufficiali 2005 €<br>Oficialaj datenoj 2005 € | Crescita %<br>Kresko % |
|---|---|---|---|
| Napoli - Roma | 1.994 | 5.600 | 181% |
| Roma - Firenze | 51 | 400 | 684% |
| Firenze - Bologna | 1.074 | 5.400 | 403% |
| Bologna - Milano | 1.482 | 6.700 | 352% |
| Milano - Torino | 1.074 | 7.100 | 561% |
| Milano - Verona | 1.125 | 4.700 | 318% |
| Verona - Venezia | 869 | 3.900 | 349% |
| Milano - Genova | 1.585 | 4.720 | 198% |
| Totali / Sume | 9.254 | 38.520 | 316% |
| € = milioni di euro / milionoj da eŭroj. | | | |

Una cosa di certo corre: l'aumento dei prezzi. Nella tabella, il valore dei contratti firmati nel 1991 e la crescita, per adeguamento prezzi, fino al 2005. La Roma-Firenze è cresciuta più di 6 volte, la Milano-Torino più di 5 volte. In media, l'aumento è più del triplo. Senza contare gli interessi. (fonte: *Quasco*).

La prima immagine è quella di uno scontro: da un lato la modernità, l'interesse europeo, il benessere dei viaggiatori, il traffico di merci che passa da fumosi tir a treni poco inquinanti; dall'altro un esercito di valligiani che protestano perché non vogliono opere «nel loro cortile», eccitati da capopopolo di estrazione *no global*. La seconda immagine è una scelta illustrata più o meno così: insomma, volete i treni veloci o no?

Pochi - poco ascoltati, poco intervistati - hanno cercato di opporsi a questo modo di affrontare la questione Tav in Val di Susa e, in generale, la questione come si è sviluppata nel nostro paese. Facendo dei conti, verificando le prospettive del traffico (di passeggeri e di merci), svelando la bugia che sta alla base di tutto l'affare Tav. Uno di questi è di sicuro *Ivan Cicconi*, ingegnere bolognese, direttore di *Quasco*, una società mista pubblico - privata che si occupa, tra l'altro, di appalti e trasparenza. Dice Cicconi: «Il sistema Tav, solo per le nuove tratte, costerà oltre 50 miliardi di €. La sua sostenibilità finanziaria può essere garantita solo da uno Stato impazzito che voglia imporre, dal 2010 in poi, manovre finanziarie di qualche miliardo di € l'anno, ogni anno, per almeno 30 anni». Ma di questo, si è parlato? Magari per confutarlo? Secondo l'allora ministro *Pietro Lunardi* la Tav in Val di Susa «è ormai solo una questione di ordine pubblico». Secondo molti altri, invece, è prima una questione di soldi.

Tutto il sistema Tav italiano è basato su un equivoco. Nasce, infatti, sostenendo che le nuove linee ferroviarie saranno il frutto di investimenti pubblici (al 40 per cento) e privati (al 60 per cento). Facendo ancora un passo indietro, nasce con una decisione curiosa. Come ricorda *Claudio Cancelli*, docente del Politecnico di Torino, in

un libro a più voci (*Travolti dall'Alta Voracità,* Odradek edizioni, Roma), «in Italia ci si era orientati su treni veloci ad assetto variabile, i *pendolini*». Con questi treni, tra l'altro frutto della creatività italiana, si potevano raggiungere i 200 km/h riducendo del 30-% i tempi di percorrenza. Senza dover costruire nuove linee. Semplicemente, potenziando quelle esistenti. «Che, per guadagnare qualche altra decina di minuti, ci si lanciasse in un investimento di 50 miliardi di €, sembrava incredibile» ricorda il professore. Invece è accaduto. «Un mistero: persone che hanno apparentemente programmato un disastro economico, sapendo di farlo». Qual è il trucco? Che le perdite venivano addossate alla comunità e i guadagni sarebbero andati a chi gestiva l'affare. Infatti di quel 60% di investimento privato non c'è ombra. «Privato» si considera l'apporto di una Spa, formalmente privata, le Ferrovie, che tuttavia ha un unico azionista, il Tesoro. Con un'aggravante: lo Stato si addossa gli interessi sui prestiti fatti alla società e li paga alle banche di anno in anno. E questa è la sola voce nel bilancio pubblico, il resto avviene «fuori», in un'area che è privata solo apparentemente.

L'ideatore del meccanismo è il ministro *Cirino Pomicino*, nel 1991. Ma i governi *Berlusconi* ufficializzeranno il metodo, legalizzandolo e rendendolo infallibile. Un metodo che si sintetizza così: le Ferrovie, attraverso la Tav Spa, danno incarico di costruire le linee a un *general contractor,* che poi appalterà i lavori a terzi. Il *general contractor,* tuttavia, non ha alcuna responsabilità nella gestione finanziaria, detto altrimenti: non mette soldi, non gestirà l'opera, non rischia sul rapporto costi-guadagni. E, dunque, ha tutto l'interesse - come osserva Ivan Cicconi - a far lievitare tempi e prezzi. Cosa che puntualmente accade: dal 1991 al 2005, le tratte Tav vedono crescere i tempi di anni e i costi - in media - del 316%, come calcolato da Quasco sui dati forniti dagli stessi interessati e ritenuti ottimistici. Significa un aumento di oltre tre volte il previsto, contro una media europea di crescita pari al 30 per cento. Basta fare un raffronto: in Francia l'alta velocità costa 15 milioni/km, in Spagna ancora meno. Da noi? 38 milioni/km!

I *privati* sono una bugia. Lo scopre, con sconcerto, il ministro *Claudio Burlando* (governo *Romano Prodi*), nel 1996: «Si è detto che c'erano privati disponibili a fare investimenti» dichiara «ma quando siamo andati a vedere abbiamo constatato che era una cosa falsa... È bene che si sappia che la quota pubblica è finita, e il 60% dei privati non si è mai visto».

